

TEA-BULTENO

21^a JARO - N° 146

NOVEMBRO-DECEMBRO

N. 11-12/2018

Multaj ŝatus fraŭdi la ŝtaton pri siaj impostoj, sed nur la plej riĉaj sukcesas en tio, tial la malriĉuloj sciu, ke ili devas pagi la impostojn ankaŭ por ili. *William Carl Brown (pseŭdonimo)*

Karaj Gelegantoj

Tiu ĉi estas la lasta Bulteno de la 2018^a jaro. Kiam vi ricevos la postan, ni jam estos ensaltintaj en la Novan 2019^{an} Jaron, pretaj turni la paĝojn de la nova kalendaro. Ĉiu tago en la nova jaro estos aparte grava por ni triestaj esperantistoj, ĉar tre malfacilan taskon atendas ni ĉiuj, nome la organizadon de la



86a
Itala Kongreso
de Esperanto
24-31 aŭgusto 2019



Grandioza defio, ĉu ne? Nepre bezonatas serioza engaĝiĝo de multaj volontuloj, por igi ĉi tiun kongreson plensukcesan, laŭ ĉiaj vidpunktoj. Ni kalkulas je vi, je viaj sindediĉo, helpemo, entuziasmo, konstanta partopreno en la preparlaboroj dum pluraj monatoj, ĝis la fina triumfo! Kaj se ĝi efektive estos triumfo, tio dependas nur de ni, organizantoj kaj kunlaborantoj. Necesas ne nur materiala aŭ fizika helpo, sed ankaŭ via subteno, viaj sugestoj, konsiloj, informoj, instigoj: ĉio ĉi stimulos nin

ĉiujn laboradi por maksimumaj atingoj.

En tiuj ĉi lastaj jaroj mi havis la plezuron ĉesti kelkajn italajn kongresojn, kiuj - sincere dirite - estis mirinde aranĝitaj, precipe ĝueblaj pro la bonegaj programoj, pro la glata organizado kaj pro la notinda ĉeesto de internacia samideanaro. Kaj ni ne parolu pri la ekskursoj, ĉiam tre trafe elektitaj, kiuj donis la eblon funde ekkoni la kulturajn kaj naturajn karakterizaĵojn de la gastiganta regiono.

Feliĉe, laŭ la turisma vidpunkto, Triesto kaj ties ĉi regiono povas prezenti siajn plej diversajn "vizaĝojn" allogantajn kaj miregantajn eĉ la plej pretendemajn vizitantojn. Tamen prepari kaj efektivigi la plurajn okazontajn ekskursojn donos zorgegon al la loka komitato... Nu, peza estos nia tasko, sed kiel diras la proverbo: *Unueco donas fortecon*, do kune laborante, kune preparante, kune ŝvitante, kune... diskutante kaj eĉ disputante, ni "atingos la celon en gloro!"

Triesta Esperanto-Asocio estas maljuna, tre maljuna, jam 112-jara, sed ĝi plenas je entuziasmo, kaj entuziasmo kreas energion, inventemon, brilajn ideojn ... Konklude, ek al labor': ni atendas vin en la TEA-sidejo! **Elda**

FOTO-POŝTKARTA KONKURSO


ĈU VI KONAS LA MALNOVAN TRIESTON
KAJ TIES ĈI ĈIRKAŬAĴOJN?

Elprovu viajn sciojn partoprenante en tri konkursoj, organizataj de TEA, dum tri sinsekvaj vendredaj novembraj vesperoj, la 16^a, 23^a kaj 30^a ekde la 20^a horo.

PRI KIO TEMAS?

En la du unuaj vendredoj estos projekciitaj 50 fotoj, dum je la 23^a, 55 foto-poŝtkartoj. Kelkaj el ili prezentas bildojn de iamaj italaj vilaĝoj aŭ urbetoj.

En tiuj konkursaj tagoj, ĉiu partoprenonto ricevos folion sur kiun oni devos skribi, apud la numero de la unuopaj bildoj, la nomon de la strato, de la kvartalo, aŭ de la loko.



Al ĉiuj fotoj estos atribuitaj poentoj laŭ la rekonmalfacileco. Fine estos sumigitaj la poentoj gajnitaj en ĉiuj tri konkursoj: tiuj, kiuj klasifikigis je la unua, dua kaj tria lokoj, ricevos kiel premio interesan libron pri Triesto.

Vi estas invititaj partopreni en ĉi tiu konkurso por elmontri viajn sciojn pri via urbo.



Laste trovitaj!

Lastatempe mi havis la eblon aĉeti malmult-koste poŝtkarton el la jaroj 1920^{aj}, kiu plurfoje aperis en tiu aŭ tiu ĉi aŭkcio sed kies kostoj - laŭ mia juĝo - ĉiam estis tro altaj.

Temas pri reklamkarto de la AMIKA RONDO DE LA VERDA KATO, Parizo.



Ekde mia esperantistiĝo vekis en mi apartajn simpatiojn kaj al-tiron la personeco de Raymond SCHWARTZ, la plej sprita E-verkisto, la plej lerta ĵonglisto per Esperantaj vortoj, humoristo, ŝercisto, kabaretisto ktp. Kiam - jam en foraj tempoj! - puŝite de mia iama instruisto Renato Bisi, i.a. longjara prezidento de la Triesta E-Asocio, mi decidiĝis alfronti la triagradan

ekzamenon, leginte la ekzamenprogramon kiu postulis proponi literaturaĵon, mi elektis prezenti unu el liaj verkoj, nome "La Verdka Testamento"-n (1926). Konsternita estis la tiama ekzamenkomisiono pro tiu mia elekto. Oni devas prikonsideri, ke inter la ekzamenintoj estis: Aldo de' Giorgi, Clelia Conterno Guglieminetti kaj - se mi ne mismemoras - ankaŭ Mario Dazzini, ĉiuj eminentuloj ne nur de la itala Esperantujo. Malgraŭ ĉio mi sukcese konvinkis ilin per mia referaĵo pri la grava valoro, por nia originala literaturo, de tiu eksterordinara rimisto kaj prozisto, hodiaŭ bedaŭrinde iom tro flanke lasata de la nuntempa esperantistaro.

Preskaŭ ĉiujn liajn verkojn mi posedas, kiujn de tempo al tempo - kiam iom da libera tempo mi ĝuas - mi reprenas enmane kaj plensatiĝas per liaj vervaj poemoj kaj satiraj prozaĵoj. Tial hodiaŭ, danke al la rubriko "Laste trovitaj" vi konatiĝos kun Raymond Schwartz tra mallonga biografio kaj kelkaj liaj - foje cerbumigaj - elpensitaĵoj.

Li naskiĝis en Metz (nun en Francujo) en 1894, kie li mortis en 1973. Li estis franco kaj laboris komence kiel bankdirektoro. En 1909 li esperantistiĝis kaj en 1913 fondis, en sia naskiĝloko, la grupon "Amika Rondo".

Li komencis gvidi en Parizo la famajn Esperanto-Kabaredojn: *Verda Kato* (1920-26), *Bolanta kaldrono* (1936-39) kaj *Tri Koboldoj* (1944-56). Preskaŭ de sia esperantiĝo Raymond Schwartz ekpublikigis versaĵojn aŭ artikolojn en pluraj ga-



zetoj, precipe en LITERATURA MONDO. Li kunlaboris do ankaŭ kun FRANCA ESPERANTISTO, LA NICA LITERATURA REVUO kaj SENNACIECA REVUO, krom mem redakti la satiran gazeton LA PIRATO (1933-36). Libroformate estis eldonitaj: Prozo ridetanta (1928); La Stranga Butiko (1931); Anni kaj Montmartre (1930); La Ĝoja Podio (1949); Kiel Akvo de l' Rivero" (1963); ...Kun siaspeca spico! (1971); Ne kiel Meier - rilata al la ata/ita diskutado/disputado (1965); Vole ... Novele (1971). Lastpaĝe de ĉi libro, jen la konkludaj Ŝvarcaj vortoj: "Se, malgraŭ miaj honestaj klopodoj, vi dum la legado de tiu ĉi volumo tamen endormiĝis, bonvolu pripensi, ke, se estas "neniu rozo sen dorno", same estas "neniu prozo sen dormo!" Pri li diris:

Kálmán Kalocsay, en la Enciklopedio de Esperanto (1934):

"En Schwartz la Esperanta mondo trovis sian humoriston, kiu la tro verdajn flankojn de la movado scias mirinde eklumigi per sia buba spegulpeceto. En LA PIRATO li estas vere la "terura infano" de la Esperanta familio: nenio restas kaŝita antaŭ li kaj nenion li indulgas, kiu aŭ kio estas inda je grimaco aŭ pinĉo. Sed pinĉante per moko, samtempe li tiklas per sprito, tiel ke la pinĉito mem devas ridi anstataŭ indigni. [...] Ĉio ĉi, prezentita per perfekta verstekniko, montras lin kiel simpatian bohemon, kiu havas tre sanan racion, grandan ĝukapablon pri la etaj ĝojoj de l' vivo, kompreneman ridon pri ĉiu homa malforto, sanan ironion pri ĉio gravmiena kaj hipokrita."

El **RIMPORTRETOJ** de Kálmán Kalocsay:

Jen Raymond Schwartz, kun vinbotelo,
La ĉarma an' de Epikur'.

La verdan Katon, ho terur'!

Li pikis morta per ombrelo.

Kaj post la streĉ' de l' kata felo

Li testamentis per tambur' ...

Jen Raymond Schwartz, kun vinbotelo,

La ĉarma an' de Epikur'.

En verso, ŝerco kaj novelo,

Grimaco kaj karikatur'

Ni ĉiam sentas kun plezur'

Aromon de la moskatelo.

Jen Raymond Schwartz, kun vinbotelo!

Gilbert René Ledon, el *kabareto.esperanto.cc*: "La personeco de Schwartz restis en *siaspeca spico* tra la panteono de la esperantaj beletristoj, kiel homo, kanzonisto, humoristo, romanisto kaj eĉ instruisto. Li posedis optimisman filozofion el kiu konstante fontis ironio, humro

kaj bontona senmalica satiremo... sed eventuala koleremo lia tuj senarmigis ĉiujn apud li. Li kvazaŭ postulis perfektecon en la uzo de Esperanto. Verdire lia stilo kun konstantaj vortludoj, kalemburoj (nPIV: *Vortluda mistranĉo: ekz. amuzo/am-uzo ks*), aludoj, vortomistranĉoj aŭ kunmetadoj donis tekstojn, kiujn nebonaj regantoj de la lingvo, malfacile povus kompreni... kaj ridi. Kaj lia ĉefa merito estas la verva vivigado de Esperanto sub ĉiuj formoj... post Raymond Schwartz neniu povas diri, ke Esperanto estas morta lingvo!"

Fontoj: EdE; Vikipedio; Trovanto; www.esperanto.kabaredo.cc, zorge de James R. Piton.



Kaj nun, kara Leganto, ĉu vi kuraĝas sincere konfesi, ke ankaŭ vi estis inter kiuj ŝatis grupe, ĉirkaŭ la fajro aŭ marborde, kunkanti la fame konatan kanzonon "Ĉiu - ĉiu"? Ankaŭ mi estis inter tiuj! Kaj nun, ni ĉiuj, eble, hontas por esti gurde kantintaj ĝisnaŭze la saman rekantaĵon! Mi varme esperas, ke ne. Kaj nun - kial ne? - ni relegu la Schwartz-an refrenon kiu gajigis niajn junularajn jarojn!

Muziko de **Nicanor Molinare**

Esperantaj vortoj de **Raymond Schwartz**

Ĉiu, ĉiu, ĉiu, ĉiu
 Ĉiu homo vidas tuj,
 Ke l' plej bela familio
 Troviĝas ĉe ni, en Esperantuj!
 Ĉiu, ĉiu, ĉiu, ĉiu
 Scias, ke sub Verda Stel'
 Nia granda familio
 Konsistas el
 Sanktuloj de l' ĉiel'!

Kaj nun: ĉu vi konas la ĉi-suban noveleton? Se jes, vi rajtas ignori ĝin; se ne, ĝuu kelkmilitan legadon de tipa Sĉwarca produktaĵo.



Raymond
 Schwartz
Nelojale

Mi sidis hejme,
 sur la sola seĝo,
 kiun mi ankoraŭ
 posedas, ĉe mia
 skribotablo kaj
 plej serioze fumis
 mian pipon.



La loĝejmastrino eniris kaj senvorte transdonis al mi vizitkarton:

Sinjoro Lak Sigil
 Re prezentanto de U.E.A.

Kiam oni estas esperantisto, oni miras pri nenio. Tamen mi unue embarase tusetis, sed tuj poste ekkomprenis, ke estas mia sankta sam-

ideana devo akcepti reprezentanton de U.E.A. Kaj kun heroa decido mi petis:

"Bonvolu enirigi tiun sinjoron tra la pordo!"
 Dum ŝi iris, mi formetis mian pipon, prenis multajn paperfoliojn kaj skribadis kiel poeto, kiu ĵus havas bonegajn ideojn kaj samtempe atendas intervjuiston. Ĉar - kiu scias? - eble tiu sinjoro Lak Sigil estas sendita de la gazeto de U.E.A. por vidi min en mia verkejo kaj poste skribi interesan artikolon pri mia poeta laboro!

Intertempe li envenis kaj haltis atende ĉe la pordo. Granda leda valizo pendis de lia maldekstra mano. Mi kompreneble ne rimarkis lin, sed klopodis verkante fari bonan impreson. Atentige pri sia ĉeesto li delikate ternis. Nur nun, subite lin ekvidante, mi komplimentis: "Ho, pardonu, sinjoro delegito! Mi estas tre kontenta konatiĝi kun vi, - bonvolu sidiĝi!" kaj mi vokis al la loĝejmastrino, ke ŝi alportu seĝon por mia vizitanto. Kaj mia vizitanto deklamis: "Mi petas vian pardonon, estimata sinjoro, se mi ĝenas, sed mi..."

Mi sukcesis interrompi lin:

"Negrave, honorinda samideano, - mi estis ĵus verkanta senpretendan poemon por via bonega gazeto; krom tio mi nuntempe ankaŭ skribas la *Historion de niaj Eminentuloj* kaj la lastan ĉapitron de la *Kompleta Analizo pri la morala influo de virinaj Delegitoj*, plue mi diris al vi, konfidence, ke mi intencas pasigi la someron en Svislando kaj ke mi ankoraŭ ne scias, ĉu mi konsentos fariĝi akademiano."

Kontraŭe al la kutimo de ĉiuj intervjuistoj sinjoro Lak Sigil nenion notis sur libreton; li diris nur "bone, tre bone!" kaj rigardis min kun tima esprimo...

"Nu, kaj vi?" mi demandis kuraĝige, "ĉu vi alportas novaĵojn pri UEA?"

Per tiu demando mi ŝajne ekpinĉis la taŭgan kordon de lia parolemo, ĉar de nun, nehaltigeble, li paroladis kaj de tempo al tempo, per signifaj gestoj, pliklarigis la malluman sencon de siaj vortoj. "Novaĵojn pri U.E.A.?" li profunde ekspiris, "jes, sinjoro, jen mia valizo! Mi alportas novaĵojn eksterordinarajn, renversajn! Sinjoro, ni ĵus eltrovis aparaton, dank' al kiu de nun ĉiuj umbilikoj povos libere kaj normale disvolviĝi..."

"Sed pardonu..."

"Ne kontraŭdiru, sinjoro, mi konas jam viajn argumentojn. Ili valoras nenion! Vi ne povas nei la evidentecon! De multaj generacioj la homoj zorgas pri sana fortigo de siaj membroj, sed ili tute ne plu atentigas la kreskigon de sia umbiliko. Ha, sinjoro, niaj praavoj havis grandiozajn umbilikojn, kaj - kiel rakontas Homero - ili estis fieraj pri tio. Cetere, ĉu ne ankaŭ la umbiliko estas... hom-ero? (Kontente li ridetis pri tiu dube-bongusta vortludo, sed ►

tuj li daŭrigis...) Jes! Ĝi estas eĉ la centro de la homo, kaj tion ne forgesu! Tial, sinjoro, nia entrepreno ĝustatempe fabrikis taŭgan aparaton por eduki la umbilikon, - ĉu vi aŭdas? ... por eduki la umbilikon, kaj per tiu aparato ni jam atingis preskaŭ miraklajn sukcesojn. Vi tuj vidos. Permesu al mi adapti tiun ĉi aparaton al via korpo, ĉar pro malalta prezo ĝi estas facile akirebla de ĉiuj...."

"Sinjoro!" mi tondris, "la farso sufiĉe daŭris! Kiamaniere tio koncernas nian U.E.A.?"

Trankvile li respondis:

"Dio mia! Vi ne komprenis? - Mi estas reprezentanto de la **Umbilika Eduk-Aparato!**"

Kaj nun, el La stranga Butiko tikla versaĵo pri:

La Diversaj Aĝoj de l' Homo

En supra ĉambro, lulo... lulo...

Anĝele dormas la etulo:

Etaĝo.

Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras

Kaj pri la bela mondo miras:

Miraĝo.

Jam ne plu side li tamburas,

Sed tra la dom' explore kuras:

Kuraĝo.

Kun vundoj li (kaj sen rubandoj)

Revenas el stratbubaj bandoj:

Bandaĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo
Knabinon ĉien sur la vojo:

Vojaĝo.

Al ŝi li donas sian nomon

Por fondi kune novan domon:

Domaĝo.

Li tiam estas tre utila

Fortika viro, kvankam vila:

Vilaĝo.

Kaj post rapida tempopaso

Postrestas nur senviva maso:

Masaĝo.

P.S.

Ni ne apliku al virino

Ĉi tiun viv- kaj rimo-saĝon,

Ĉar de l' komenco ĝis la fino

Ŝi ĉiam havas la saman aĝon:

Avantaĝo.

Lastlaste el La Verdkata Testamento ni gustumu:

Ero (*)

Oni rulis Molière

En la neĝo por lin lavi

Kaj per tio mem... ĉefverkon

Oni tuj sukcesis havi!

"Lava rulo" de Molière....

(*) Se tiu ĉi versaĵo aspektas stulta, ĝi kompense ne estas longa (eble la simpatia aĉetinto bonvolis tion konstati mem!)

NOVA ZEO EN UKRAINIO

Tuj antaŭ la komenco de la 24^a Kongreso de Ukraina E-Asocio (UkrEA) oni starigis memortabulon dediĉe al la fama poeto, verkisto kaj esperantisto Vasil Eroŝenko.

La ceremonio okazis en Lvivo la 19^{an} de oktobro 2018. Lvivo estas unu el la ĉefaj kulturcentroj enlandaj. En 1991 multaj urbaj stratoj estis renomitaj, el kiuj unu sufiĉe longa strato ricevis la nomon Eroŝenko. Tie sur la muro de la plej bela kaj arte ornamita domo estis starigita la tabulo.

La programo estis organizita de la prezidanto de UkrEA, s-ro Eŭgeno Kovtonjuk. Salutis s-ino Oksana Stelmaĥ, membro de la konsilantaro de Lvivo. Sekvis la saluto kaj gratulo de la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill.



V. Eroŝenko (1890-1952) estis blinda esperantisto el Rusujo de ukraina deveno.

18-jara li eklernis Esperanton, kaj post kelkaj jaroj li vojaĝis al Britujo, kie li vizitadis lernejon por blinduloj.

En 1915 li vojaĝis al Japanujo: tie li studis masaĝadon ĉe blindula lernejo en Tokio, ĉar li aŭdis, ke japanaj blinduloj ofte vivtenas sin per tiu profesio. Tie li tre ageme informis la aliajn studentojn pri Esperanto.

Post du jaroj li vojaĝis al Siamo (nuntempa Tajlando) kaj fondis tie lernejon por blinduloj. Sed tio estis nur la komenco de liaj vojaĝoj. Poste li veturis ankaŭ al Hindujo, Japanujo kaj Ĉinujo. Eroŝenko estis politike progresema, kaj tial okazis, ke en Hindujo li estis malliberigita, en Japanujo arestita, kaj poste forsendita el tiuj landoj.

Ĉar li bone sciis la japanan lingvon, Eroŝenko verkis en tiu lingvo multajn rakontojn por geknaboj kaj tre famiĝis inter la progresemaj japanaj literaturistoj. En Ĉinujo li instruis rusan literaturon kaj aliajn temojn en Pekina universitato kaj en edukista lernejo por virinoj.

Dum la lastaj 29 jaroj de sia vivo Eroŝenko loĝis en diversaj urboj de Sovetunio, kie li verkis kaj laboris. Li fondis la unuan lernejon por blinduloj en Turkmenujo en 1935, kaj mem laboris tie dum dek jaroj.

Eroŝenko verkis plurajn originalajn verkojn en Esperanto, kaj ankaŭ en la japana kaj la ĉina.



Fontoj:
Vikipedio;
Gazetaraj
Komunikoj
de UEA;
EKO 2018-22



Koka-Kolao anstataŭ akvo. Katastrofo en Chiapas.

Estas zono en Meksiko kiu ludas per la vivoj de siaj loĝantoj: dum jardekoj la politikistoj, nur por "gastigi endome" la plurnaciajn konzeronojn¹, fermis firme siajn okulojn tute malatentante pri la eblaj konsekvencoj por la sano de la popolo, pri kiu ili estus devintaj zorgi. En *Chiapas*² preskaŭ ĉiuj anoj de samaj familioj malsaniĝis je la 2-tipa diabeto kaj pro tio la mortokvanto pliiĝis, inter la jaroj 2013 kaj 2016, je tridek procentoj, dum amputadoj kaj absoluta blindeco, kiuj estas la plej oftaj postsekvoj de tiu malsano, turmentas la ankoraŭajn vivantojn.

La kaŭzo de tiu tragedia situacio estas tre klara: la loĝantaro de tiu zono, kie ĉiutage pluvas (ĝi estas unu el la plej pluvoriĉaj meksikaj teritorioj) ne povas disponi je trinkakvo. Kiam oni diras, ke ĉio iras glate, tio signifas ke el la kranoj eliĝas, ĉiun duan tagon, netrinkebla likvaĵo pro ĝia altkvanta klorigo. Tial oni trinkas Koka-Kolaon aŭ aliajn sukerajn gas-trinkaĵojn (inkluzive de *Pepsi*). Kaj konsekvence oni malsaniĝas.

Tiu ĉi historio estis raportita de du ĵurnalistoj, senditaj de *New York Times* al *San Cristóbal de las Casas*, por klopodi kompreni tion, kio estas okazanta. Ĉio komenciĝis jam antaŭ dekoj da jaroj. Tiam iu entreprenon el usona Atlanto ricevis de la usona federacia estraro (kaj tute NE de tiu loka – notindas ke tio ĉi estas absolute tre grava, ĉar evidente la pagita mono ne estas investata surloke!) la PERMESON utiligi la akvon de la naturaj putoj, interŝanĝe de ia sindevigo plibonigi la retajn akvodistribuadajn servojn inter la loĝantaro de *Chiapas*.

Ĝis hodiaŭ nenio estis realigita por modernigi la akvoduktojn kaj la akvan reton, kiuj pli kaj pli ruiniĝas. Tute mala estas la situacio por la entreprenon, kiu elsuĉas pli ol unu milionon da litroj de akvo kaj pagas po 10 centimoj mil-litre. Ne nur! La ekstreme malmulta akvo atinganta la vilaĝojn estas poluita de koljobaciloj kaj aliaj mikrorganismoj, pro tio ĝi estas netrinkebla kaj ĉefe netrinkenda, ĉar la refluantaj akvoj ne estas purigataj, tiel ke ili mem poluas la akvoriĉajn stratumojn kaj la akvo-reton. Ĝis nun nura plibonigo farita estis la financado de puriga instalaĵo por traktado de la reflujaj akvoj, garantianta akvo-provizon al ĉirkaŭ 500 familioj en la zono de *San Cristóbal*. Laŭ la lokaj aktivuloj tio ĉi ne solvas la konkretajn problemojn, krom esti tute nesufiĉa agado.

Intertempe, dum pli ol kvindek jaroj la Koka-Kolaa entreprenon, tra sia adjudikanto FEMSA³, tre ŝirmata politike, miskomprenigis, ke tiu trinkaĵo estas saniga, ĉefe por la indiĝenaj popoloj kiel la tiel nomataj *Tzotzil*⁴, eĉ per reklamoj en la loka dialekto. Nuntempe la natria karbonato eniĝis eĉ en la ritajn ceremoniojn kaj kelkaj maljunuloj, inter kiuj multaj sanigistoj, estas plene konvinkitaj, ke tiu trinkaĵo povas resanigi ĉefe la disenterion, kaj rifuzas forlasi tiun konsumon, malgraŭ la nekontestebla disvastiĝo de diabeto. Kaj ĉio ĉi okazas ankaŭ pro la fakto, ke la kosto estas la sama kiel tiu de enboteligita akvo.

La entreprenon sin defendas, kulpigante la tumondiĝon, la tutteran plivarmiĝon, la nesufiĉan industriajn kaj urban planizadon kaj aliajn malprecizajn argumentadojn, kaj plie substrekas ke pli ol 400

personoj havas laborpostenon danke al funkciado de enboteliga fabriko. Esploristoj de kelkaj sendependaj institucioj rimarkigas, ke precipitaĵoj en tiu teritorio ne ŝanĝiĝis en la lastaj jaroj, dum diabeto, iam eĉ nekonata, ĉiujare falĉas tri mil viktimojn.

Sed la situacio povus renversiĝi. La lastatempa politika agado de Trump modifis la sentemon, tiom de la popoloj kiom de iliaj reprezentantoj, kiuj ne plu emas akcepti iajn ajn privilegiojn kaj malhonestan konduton, se tio venas de usona entreprenon. La etoso fariĝis malfavora kaj en la loĝantaro kreskadas konsciiĝo pri la propraj rajtoj kaj pri la devo de la aliaj ne transdoni malfalsajn informojn rilatajn la protektadon kaj konservadon de kiel eble plej bona sanstato.

Tiu ĉi okazaĵo en *Chiapas* klare kaj tragike pruvas, kion forta estas la ligilo inter gasakvo kaj diabeto kaj obezeco, kion la produktantaj entreprenoj mem dum jardekoj strebis, kaj strebas ankoraŭ nun, neadi aŭ minimumigi.

EIDO

Fonto: www.ilfattoalimentare.it

1. nPIV - Konzerno: Ekonomia unuiĝo de jure memstaraj entreprenoj sub unu komuna centra direkto.

2. *Chiapas* estas unu el la 32 Ŝtatoj de Meksiko. La plej granda urbo estas la ĉefurbo *Tuxtla Gutiérrez*, dum la plej grava turisma urbo estas *San Cristóbal de Las Casas*.

3. FEMSA estas meksika plurnacia kompanio kiu partoprenas en la industrio de trinkaĵoj, kaj en la komerca kaj restoracia sektoroj.

4. *Tzotzil* el la centraj alt ebenaĵoj de *Chiapas* estas etna grupo devenanta de la amerikaj indiĝenoj (*indios*) kaj rektaj pranepoj de majaoj. Ili parolas la *tzotzil*-an lingvon.

Novembra Programo

2a, vendredo	Sidejo fermita
6a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
9a, vendredo	14h50 - Radio Uno - Pri la Itala Kongreso 2019 en Triesto 20h00 - Ekskursoj dum la kongreso
13a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
16a, vendredo	20h00 - 1a parto de Konkurso pri triestaj fotoj
20a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
23a, vendredo	20h00 - 2a parto de Konkurso pri triestaj fotoj
27a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
30a, vendredo	20h00 - 3a parto de Konkurso pri triestaj fotoj

Decembra Programo

4a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
7a, vendredo	20h00 - Konkursa Premiado; sekvos BILDOJ PRI PORTUGALUJO
9a, lundo	14h50 - Radio 1 - 9 minutoj kun...
11a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
14a, vendredo	20h00 - Ni laboru por digne festi la Zamenhofan Tagon!
16a, dimanĉo en Triesto	10h30 - Ni atendas vin ĉiujn por la ZAMENHOF-TAGO!
18a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
21a, vendredo	20h00 - Kristnaska Festo
28a, vendredo	20h00 - Adiaŭ, 2018^a Jaro!

Programo - Januaro 2019

4a, vendredo	20h00 - ttt-ejo pri la Itala Kongreso
8a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
11a, vendredo	19h00 - Laborgrupo por la Itala Kongreso
15a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
18a, vendredo	20h00 - El nia Literaturo
22a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
25a, vendredo	20h00 - Memoroj pri UK 2017 - Koreio
29a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj

49a Malferma Tago

Gastoj: MAIA, GOBBO kaj DE KOCK

La stabo de la Centra Oficejo kaj la estraro de UEA invitas vizitantojn al la Malferma Tago, okazonta jam la 49^{an} fojon, sabaton la 17^{an} de novembro, en la UEA-sidejo, Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo. Bv rezervi la daton!

La Malferman Tagon organizas Saïd Balouchi, flanke de la CO, kaj Fernando Maia el Brazilo, estrarano de UEA pri kulturo kaj kongresoj. Krom eventuale aldoniĝontaj prelegantoj, niaj ĉefprelegantoj estos:

- la estrarano de UEA pri kulturo kaj kongresoj, Fernando Maia, kiu prelegos pri: "Sed libroj kun homoj: strategia libropolitiko kaj programoj por UEA kaj Esperanto";
- la universitata profesoro pri lingvistiko kaj Esperanto, Federico Gobbo, kiu parolos pri "Esperanto en mezlernejo, ne pro propedeŭtiko, sed pro la interna ideo";
- la historiisto Ward de Kock, kiu prelegos pri la "Nederlanda Laborista Esperantismo".

En la programo estos ankaŭ speciala momento por TEJO kaj prezentado de libroservaj novaĵoj. Aldone al specialaj ofertoj, vizitantoj povos profiti de la ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA - N-ro 762

Bonan Kristnaskon 2018^{an} kaj Pacan 2019^{an} Jaron al la TEA-anoj kaj Gelegantoj deziras Triesta Esperanto-Asocio!



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunvenotagoj: marde 18-20; 20-22; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Retoj: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
 www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org